TEJO

e@i-4 Seminario

en Lesjöfors 2002

Versio de la 02.11.2002

Dokumentaro kaj konsilaro pri (reta)

Informadi

Kompilita de:

Anna Skudlarska
David-Emil Wickström
Jevgenij Gaus
Lu Wunsch-Rolshoven
Sonja Petrovic
Ziko M. Sikosek

Enhavo

Ĝenerala Strategio 3

Informado per
- Gazetoj 5
- Radio / Televido 7
- Publikaj prezentoj 9
- Informiloj 11
- Retaj informiloj 13
  - Retiketo
- Standoj / budoj 16
- Afiŝoj 17

Konsiloj pri
- Tekst-aspektigado 19
- Informado pri aranĝoj / renkontiĝoj 21
- Rilatado kun ĵurnalistoj 23

Ne-mitaj faktoj pri Esperanto 24
Oftaj demandoj de ĵurnalistoj kaj eblaj respondoj 26

Frapfrazo de RIC

Ĉu ĝi pretas, ĉu ĝi pretas, ĉu ĝi pretas por la meto en RIC-paĝar'?

Ĝenerala inform-strategio

Principoj:

- **Oni ne uzu argumentojn kiujn oni malfacile povas defendi** ("ĉies dua" aŭ "lingvo de EU" estas malpli konvinka ol "lingvo de *kaŝe montrite 'interesa, klera...*' internacia komunumo")
- Oni parolu pri kio estAS, kaj ne kio povUS esti
- Kiam vi parolas pri E-historio, zorgu ke la unuaj jardekoj ne okupas tro grandan parton
- La Esperantistoj estas: lingvemaj, kleraj, ĝentilaj kaj toleremaj. Ne diru tion, sed montru tion!
- Oni donu seriozajn, verecajn/realismajn informojn
- Oni ne portu tro da E-signoj kaj ne aspektu sektisme
- Oni strebu informi sed ne konvinki, oni ne estu altrudema
- Povus esti bone prezenti ekzemplajn Esperantistojn, kiel ili eklernis la lingvon ks, kaj farante tion oni uzu interesajn, klerajn kaj socie-engaĝitajn homojn, i.a. ankaŭ famulojn (sed NE mitajn famulojn, kiuj ne vere estis E-istoj)
- Depende de situacio kaj kunteksto, oni povas mencii la famajn subtenantajn organizojn kiel Unesko kaj UN, sed nur se oni scias pli konkrete pri kia subteno temas (koni la 'subten'-dokumenton)
- Decidante pri uzindaj kaj maluzindaj vortoj oni tre atentu pri tio kion kiuj vortoj elvokas en kiuj lingvoj, kaj kiel kunteksto donas signifon al vortoj
- Ne rakontu pri movadaj dokumentoj, ekz. "Praga manifesto", sed provizu ilin, se vi volas (aŭ se la ĵurnalisto demandas).
- Oni ne uzu internajn movadajn dokumentojn kaj esperantan ĵargonon por la ekstero. Ĵargono estas ekzemple "delegito", "verda lingvo", "movado", "samideano", "la (granda) majstro", "finvenkisto", "raŭmisto" sed ankaŭ "IS", "IS", "TEJO" ktp. Se vi devas traduki "TEJO", tiam ne traduku laŭ vorte, sed redonu la nomon tiel, kiel oni normale farus en via lingvo.

"Danĝeraj" aŭ evitindaj diroj:

- "Ĝi havas 16 regulojn kaj estas senescepta" - **ne** veras, kaj krome elvokas senton de primitiva / malviva lingvo.
- "Esperanto estas logika / artefarita" – elvokas senton de ne-viva, malmola lingvo.

- ”Zamenhof estas kreinto de Esperanto” – pli bone diri ’iniciatinto’. Ne prezentu ĝin kiel la privatan lingvon de unu persono.
- “Esperanto havas fortan kulturon, sed tamen ĝi estas neŭtrala ĉar ĝi ne portas kulturon de iu nacio…” – Estas kontraŭdiro se ne klaras ke “Esperanto havas fortan **ne**nacian kulturon”).
- ”La angla malbonas ĉar...” – oni **ne** ataku / primoku aliajn lingvojn por varbi pri E-o (oni akceptu komunikan kaj aliajn rolojn ankaŭ de la angla kaj ceteraj lingvoj)
- Detaloj pri sociaj kutimoj de esperantistoj (ekz. Tekilumado, La Bamba, miksitaj duŝejoj) ne nepre lasos pozitivan impreson ĉe ĝenerala publiko.

Eblaj reagoj al kontraŭ-argumentoj:

- nombro de E-kluboj en Eŭropo malkreskis dum la lastaj 10 jaroj – jes, sed tio estis ĝenerala tendenco ĉe NRO-j en Eŭropo; la entuta E-aktiveco tamen kreskis
- *daŭrogota*

Gazetoj

Gazetaraj komunikoj

Du celgrupoj:

- ĵurnalisto (interesigu ilin pri la teksto, emigu ekscii pli ks)
- leganto (la fina celato, taŭgu ankaŭ por li/ŝi)

La teksto mem:

- Respondu demandojn (en unua alineo laŭeble):
  - Kiu?
  - Kio?
  - Kial?
  - Kiam?
- Decidu pri titolo post verkado de la komuniko
- E-on oni povas prezenti kiel (sed ne samtempe):
  - internacia lingvo
  - lingvo kiu ligas homojn de multaj landoj

Estu dividita en alienoj kaj facile superrigardebla

Pli facilas publiki informojn en lokaj/regionaj gazetoj, tial ofte indas ”regionigi” la komunikon (anstataŭ diri ”Eldoniĝis nova PS” diri ”5 adresoj de homoj de regiono... aperis en PS, libro kun adresoj de homoj de la tuta mondo...”).

Estas bone aldoni (ne pli ol 20-30 linian!):

- ĝeneralan tekston pri Esperanto
- prezenton de koncerna E-organizo

Pri sendado:

- sendi al multaj adresoj (se oni jam verkis ion, oni tion maksimume utiligu)
- ne forgesi ke retpoŝto atingas ĉefe junan generacion, kaj facile perdiĝas inter rubaĵo
- oni prefere sendu aŭ nur en teksto de la mesaĝo aŭ kaj en la teksto, kaj kiel aldonaĵon, ĉiukaze kun trafa kaj klara temlinio (”30 junuloj de 20 landoj kunvenas” pli bone ol ”Gazetara komuniko de TEJO nr. 132”)
- distanckopio (fakso) taŭgas
- paperpoŝto bezonatas kiam oni kunsendas paperajn informilojn/materialojn
- se temas informo kiun oni vere volas disvastigi (pri aranĝo), oni sendu plurfoje – nur ĉ. 10% de komunikoj je fino estas publikigita

Artikoloj

- informiĝu pri koncerna gazeto/eldonaĵo – kiu eldonas, pri kio informas, kiu legas ĝin
- certiĝu pri kion redaktanto volas de vi
- planu kiun mesaĝon/senton/impreson vi volas transdoni
- verku en konvena stilo, konforma al gazeto, temo, via mesaĝo, vi mem...
- ne sufiĉas transpreni erojn de aliaj informiloj, bezonatas verki ion mem
- rakontu pri veraj kaj konkretaj aferoj (pli interesas via vizito al alia lando, ol opinio pri UN)
- ekzistas diversaj stiloj por verki artikolojn, lernu verki (ekz. de diversstilaj komencoj: ĝenerala: “Internacia komunikado estas grava. Pri tio oni nun parolas dum renkontiĝo en Lesjöfors...” aŭ konkreta: “’Mi ŝatas Svedion sed ne la svedan veteron’, diras Giuseppe, 31-jara Italo. Slavik de Rusio kaj Heming de Norvegio ne ĝeniĝas pri tio, kaj la retso de partoprenantoj...”)
- titolo estas grava, kaj oni elektu ĝin en la fino de verkado

Radio- kaj televid-intervjuoj

Kiel kontakti radion/TV (se ili ne mem invitis vin):

- Informiĝu pri ekzistantaj radio/TV-elsendoj en via regiono
- Trovu informojn, kiuj povas esti interesaj por konkreta elsendo, kaj ofertu ilin al ili kaj proponu ke ili povas viziti vin.
- Regule informu al radio/TV-stacioj pri E-aranĝoj, okazaĵoj ktp.
- Se vi havas, kunsendu informilojn pri via organizo/aranĝo.
- Ne forgesu, ke personaj kontaktoj (vide aŭ telefone) multe pli efikas ol (ret)poŝtaj.
- Vizito de eksterlandano aŭ vojaĝo al multaj landoj, ofte povas esti sufiĉa kialo por gasti ĉe lokaj komunikiloj (aparte en iomete izolitaj regionoj).

Ĝeneralaj principoj:

- Kondutu (vestu vin, parolu ktp) konforme al komunikilo/programo (informiĝu antaŭe) ĉe kiu vi gastas, al aferoj kiujn vi prezentas kaj vi mem.
- Parolu klare kaj ne tro rapide.
- Ne parolu longe sen interrompo, provu paroli ne-monotone.
- Estu konciza kaj konkreta, uzu trafajn, novdatajn, personajn ekzemplojn.
- Ne superŝutu per informoj – prefere donu nur kelkajn, sed tiujn, kiuj transdonos vian mesaĝon.
- Kunportu originalan Esperanto-muzikon de populara kaj/aŭ via plej ŝatata speco.
- Ofte pli indas paroli pri aferoj kiujn oni faras per Esperanto, ol detaligi pri Esperanto mem.
- **Montru** ke Esperanto estas bona kaj lerninda, **ne rekte diru** tion. Ekzemple.: Ne varbu por la kurso rekte, sed post parolo pri E-bonaĵoj, menciu ke kurso okazos tiam kaj tie.
- Faru liston de ĝeneralaj menciindaj aferoj kaj ĉirkaŭ 3 kernaj punktoj, kiujn vi volas emfazi, ev. konsentu pri ili kun intervjuantoj (ĉiukaze ekhavu pozitivan rilaton kun homoj kun kiuj vi kunlaboros).
- Ĉiam bonas provludi!!
- Estu senstreĉa, koncentriĝu je tio pri kio vi parolas.
- Erari estas tute nature - se okazas, simple daŭrigu.

Radio:

- Se estas malfermita programo, al kiu homoj povas telefoni por starigi demandojn, interkonsentu kun iu amiko aŭskulti la elsendon, kaj helpi vin per demandoj, se montriĝos necese (kompreneble, la aliaj aŭskultantoj ne sciu, ke estas via amiko ;-)).

- Por ke via voĉo bone impresu, estu natura kaj uzu ekz. gestojn, vizaĝesprimoj ktp. kiel kutime, sed ne forgesu, ke la aŭskultantoj ne vidas vin.
- Estu ĉiam je proksimume sama distanco de la mikrofono kaj NE tro proksime.

Televido:

- Povus montriĝi utile havi kun si kelkajn E-librojn, gazetojn, fotojn de aranĝoj, lumdiskojn, afiŝojn ktp. / ktp, sed konsciu, ke oni povos vidigi nur tre malmulte.
- Se la Esperanto-klubo en via urbo ne estas tre montrinda, ne montru ĝin – oni povas ludi scenon de PS en domo de iu esperantisto, aŭ filmi ie en naturo, en biblioteko apud breto kun E-libroj, populara urba diskoteko en kiu ĉi-foje aŭdeblas E-muziko ktp.
- Junularan movadon prezentu gejunuloj (kaj ne la ”pli spertaj” aĝaj esperantistoj).
- Sidu/staru komforte, tio aspektos pli nature.
- Ne portu tre helajn aŭ tre malhelajn vestojn kiuj havu iom da kontrastoj, ekz. portu bluan ĉemizon por ke vi aspektu pli sana.
- Konsideru ke televidon spektas homoj de diversaj aĝ- kaj sociaj grupoj – sekve provu esprimi vin modere kaj aspektu iom socikonforma.

Publikaj prezentoj / Rektaj prezentoj

- en lernejoj/universitatoj (por prezenti E-on aŭ inviti al E-aranĝo)
- en diversaj kluboj, ĉe grupoj de homoj kun alia komuna ŝatokupo
- dum (antaŭ/post/dum paŭzoj) koncertoj, teatraĵoj aliaj publikaj prezentoj
- dum malfermoj de iuj kunorganizitaj aranĝoj
- ktp

Oni konsideru/eksciu:

- celgrupon
  - ne insisti je IS-etoso al bazlernejanoj aŭ lingvo-studentoj
  - mencii lerno-facilecon al ne-lingvo-interesitoj, sed ne detaligi
  - paroli pri PS al vojaĝemuloj
  - ...
- prezento-daŭron
  - je kiu oni disponas
  - dum kiu oni povas teni intereson de la publiko (bona prleego daŭras ĝenerale ne pli longe ol 30 min)
- tempon
  - oni ne vizitu universitaton en ekzamena periodo
  - oni ne varbu por aranĝo kiam homoj jam planis ion alian por tiu tempo, aŭ tro frue, kiam homoj povus forgesi, aŭ ankoraŭ ne povas aliĝi...
- lokon/etoson
- kialon de la prezento (ĉu oni estas invitita prezenti aŭ invitanta aŭskultantojn)
- enhavon de la prezento (ĉu oni prezentas Esperanton, aŭ E-organizojn, aŭ konkretan E-aranĝon)

Jes:

- laŭeble bone antaŭpreparu strukturon de la prezento kaj montro-materialojn; ankaŭ prezentu ĝin en la komenco/dum la prezento
- se eblas, provludu
- strebu prezenti nemultajn, konkretajn, facile komopreneblajn kaj memorindaj aferojn, kiuj lasos pozitivan impreson kaj plaĉajn sentojn pri E-o ĉe ĉeestantoj (uzu simplajn frazojn)
- ripetu la plej gravajn punktojn
- montrante diversajn flankojn de E-realeco, atentu ne miksi diversajn aferoj, strebu finparoli pri unu, antaŭ ol eki pri la sekva
- certigu ke homoj scias kie poste mem trovi pliajn informojn, kiun kontakti...
- prefere ofertu ion kunporteblan – informileton kun ret-adreso k.s.
- invitu lokajn ĵurnalistojn al la prezento
- ludigu laŭeble iun muzikon

- faru etajn paŭzojn se la prelego estas pli longa ol 30-40 min

Ne:

- provu diri ĉion, superŝuti homojn per informoj
- parolu tro longe senitrerompe
- promesu ke io okazos post la prezento (E-kurso, festivalo, plia vizito), kaj poste ne realigi tion

Informiloj – ĝeneralaj konsideroj

Pripensu, kiom granda via informilo estu: ĉu unufoliaĵo, ĉu pli aŭ malpli dika broŝuro.
Kriterioj: kostoj, informfluoj, enhavo.

Unufoliaĵo

Pozitivas:

- malmultekosta
- aktualigebla relative ofte (ekz. nova adreso de asocio)
- ne tiom da laboro
- verŝajneco grandas, ke interesato legos ĝin (eble eĉ ĉion)

Negativas:

- relative malmulte da spaco
- ne tiom prestiĝa

Restu je unu, du temoj, do ne tuŝu ĉiujn flankojn de E-o kaj via asocio ktp. Per facilaj rimedoj vi povas fari unu folion pli bela kaj interesa: simple faldu unu- aŭ dufoje, tiam vi ricevos plurajn kolonojn kaj havos eblecon por front-paĝo kaj dors-paĝo (aspekto de ordeco, pli prestiĝa).

Pluraj folioj, broŝuro

Konsideru: se vi havas pli ol unu folion, tiam vi bezonas agrafojn. Tio kostas relative multe. Se vi do volas havi ekz. nur du foliojn, tiam faru du unufoliaĵojn: ekzemple unu pri esperanto, unu pri via asocio. (Aŭ pri unu temo kiel lingvo, vojaĝoj per Pasporta Servo k.a.)
Plurfolia informilo indas ekde 4 aŭ 5 folioj, kiujn oni faldas (kaj oni havos 16 aŭ 20 paĝojn en formato A5).
Se vi havas plurpaĝan informilon, kompreneble ne limiĝu al malmultaj temoj. Unu temo ne havu tro da spaco por si mem, sed nur 1 aŭ 2 paĝojn.

Eblaj temoj:

- Lingvo (kun multaj ekzemploj)
- Eventuale krome: kiel lerni esperanton (ekz. rekomendo de konkreta lernolibro)
- ”Ideo” de E-o, idealismo (en ĝenerala, konvena maniero)
- Aranĝoj
- Vojaĝeblecoj (PS)
- Kulturaĵoj (ekz. libroj, gazetoj, kaj muziko, tio po unu paĝon)

- Historio
- Interreto (kelkaj longdaŭraj adresoj, eblecoj per reto: ekz. kursoj, elŝuto)
- Asocio (kiu oni estas, kiel atingi, kion faras ktp.)

Estu tre zorgema pri la korekteco de viaj nacilingvaj tekstoj; petu aliajn spertajn homojn pri kontrollegado (tio estas nemalhavebla). Kontrolu la aktualecon de informoj, adresoj, menciitaj aranĝoj.
Grafikaĵoj: Pli bonas malmultaj bonaj, ol multaj inter kiuj estas iuj nebonaj. "Malbona" signifas: tro malhela, tro neklara, t.e.: oni ne tuj kaptas la esencon de bildo, do ekzemple oni ne tuj vidas ke temas pri kantisto, kiam vi ilustras tekston pri esperanto-muziko. Rilate al grafikaj ikonoj: estu konsekvenca, kaj respektu vian domstilon.
Informiĝu ĉe via presejo pri eblecoj, limdatoj, postuloj, reguloj.

Retaj informiloj

Kreada strategio

Ekhavu bonan ideon, konsultu aliajn homojn por havi iomete da reagoj pri via ideo. Nepre pripensu la sekvajn demandojn:

- Pri kio vi volas informi / kiun mesaĝon transdoni
- Al kiu
  - aĝo
  - socia grupo
  - regiono
  - religio
  - ktp.
- Kial
- Kiujn informvojojn vi volas / povas uzi
- Kiom longe la informilo restos aktuala (maksimume 2 jarojn) kaj ligite al tio, kiom da informiloj estu produktotaj
- Kiom facila oni povas reaktualigi la informilon/ ŝanĝi ĝian enhavon
- Kian temposkemon vi havas por produkti kaj disvastigi la informilon

Kiam la provversio de la informilo pretas, nepre konsultu esperanto-parolantajn kaj aliajn homojn por havi pli objektivan bildon pri la rezulto kaj por korekti eventualajn erarojn (ortografiajn, gramatikajn, aspektenhavajn ktp.).

Retaj paĝaroj

- Esperantatiparo – nepre Unicode, laŭeble ankaŭ “x”-sistemo
- Malsama enhavo en esperanta kaj ne-esperanta versioj
- Aspekto
  - Ne difinu tiparon
  - Facile superrigardebla paĝo
  - La enhavo pli gravas ol la aspekto – la paĝaro estu facile legebla kaj alloga / plaĉa
  - Ligo al prelego pri tiparoj de Ziko
- La paĝaro estu logike konstruita kaj informoj facile troveblaj – se eblas navigilo (sed prefere ne uzu kadrojn (“frames”) por tio)
- Produktu reklambildetojn de la paĝaro por disvastigi ĝin en la reto
- Ligo al prelego de Guiseppe pri retiketo
- Strebu ke la paĝaro estu konforma al la konsiloj pri serĉmaŝinoj (la paĝo estu bone trovebla ĉe retserĉmaŝinoj).
- La paĝaro aspektu bone ĉe multaj diversaj retlegiloj (ne nur Internet Explorer kaj Netscape) kaj operativsistemoj

- Pensu pri uzantoj de malnovaj kaj malrapidaj komputiloj kaj konektoj – ne superŝarĝu unu paĝon per tro multaj kilobajtoj.

Diskutgrupo

- **Ligo al prelego de Guiseppe pri retiketo**
- Titolo de la mesaĝo respegulu la enhavon kaj estu alloga
- Se oni nur dankas pro kontribuo, tiam rekte al la koncerna persono kaj **ne** al la tuta listo.
- Plej vaste uzata estas www.yahoogroups.com (sed ankoraŭ ne havas esperantlingvan interfacon)

Retrevuoj

- Ebla servilo esperantlingva: www.abonu.com
- Prioritatu oftecon kaj mallongecon. Prefere pli ofta apero kun malpli longa enhavo, kaj pli da malpli longaj artikoloj, ol malpli da pli longaj.

Disvastiga strategio

Kiam la informilo (ne forgesu ke la prestempo povus daŭri ĝis 4 semajnoj) / paĝaro / ktp. pretas jen kion vi povas fari:

Rete

- Disvastigu ĉe dissendlistoj (retaj gazetoj, diskutgrupoj) de
  - E-aj organizoj
    - Tejo-aktuale
  - Naciaj junularaj organizoj
  - Internaciaj interŝanĝaj diskutgrupoj
    - European-Youth-Exchanges@yahoogroups.com
    - Balkanidea_info@yahoogroups.com
- Interŝanĝu ligojn kun aliaj (ne-)esperantistaj paĝaroj
  - Kontaktu la "webmaster" / ttt-estron de la koncerna paĝo
  - Ĉe diversaj retpaĝoj kiuj faras ligintersanĝojn (ekz. Tiel nomata "webring", ekz. http://www.webring.de/)
- Registriĝu en diversspecaj katalogoj kaj serĉmaŝinoj en la reto (ekz. ĉe www.google.com, junularaj ombrelorganizoj, ekz. http://mladina.movit.si/SEEintro.htm

Malrete

- Gazetoj / informiloj (mondnivele kaj de LS-oj)

- Nacilingvaj gazetoj de aliaj organizoj
- Radio / Televido

Retiketo

La principo de retiketo (reta etiketo, angle "netiquette") estas: montri ke vi ne nur zorgas pri viaj tempo, komforto, ktp., sed ankaŭ pri la celulo de via komunikado: ricevanto de retmesaĝo, leganto de retpaĝo aŭ forumo, kunbabilanto... En retpoŝto kaj forumoj, via mesaĝo estu klare kaj komforte legebla, sendepende de la uzataj komputilo kaj programo aŭ alia cirkonstancoj. Tiel vi impresos kiel inteligenta, fidinda kaj afabla retuzanto, kaj do via mesaĝo ricevos atenton kaj simpation.

Praktikaj konsiloj:

- Sendu mesaĝojn nur al homoj aŭ retlistoj kiuj vere povas interesiĝi pri ili. Se vi nepre volas sendi al multaj adresoj, metu ilin en la kampon "bcc" por ke ne komenciĝu amasa respondado al ĉiuj.
- Sendu _nur_ simplan tekston (PLAIN TEXT/US-ASCII) kaj ne HTML-on aŭ "riĉan tekston". Neniam kunsendu dosierojn ("attachments") sen antaŭa interkonsento kun la ricevonto. Anstataŭe, metu la dosieron en atingeblan retejon kaj sendu mesaĝon en kiu vi donas la adreson kaj mallonge klarigas pri kio temas.
- La titolo (temlinio) tuj komprenigu pri kio temas.
- En la kapo (header) de la mesaĝo aperu via vera plena nomo.
- Skribu klare, orde kaj afable. Prefere sendu plurajn etajn, unutemajn kaj unulingvajn mesaĝojn anstataŭ longajn mesaĝojn kun miksita enhavo.
- Zorgu pri viaj lingvaj eraroj, sed neniam korektu tiujn de aliuloj.
- Se vi aldonas aŭtomatan subskribon al viaj mesaĝoj, ĝi longu maksimume 4 liniojn kaj enhavu nenion ofendan, sektecan aŭ iel ĝenan.
- La celo de citado estas provizi sufiĉe da kunteksto por komprenigi vian respondon: do forigu el la citaĵo ĉion neutilan kaj lasu nur la frazojn al kiuj vi volas reagi. Aperu *unue* la citaĵo kaj *poste* la responda frazo. Forigu el la citaĵo ankaŭ la eventualajn subskribojn kaj la aŭtomate aldonitajn varbaĵojn.

Standoj

- Antaŭ ol iri al foiro, oni konsciu kia speco de homoj vizitas ĝin (ankaŭ ĉu entute indas la penon prezentiĝi tie).
- Via celo estu: kontakti al multaj homoj, kaj en konvena maniero. Konvena signifas, ke oni konforme al unuopa interesato kondutas konvene. Se iu ne interesiĝas, tiam vi simple ne ĝenu lin – per tio vi konvene kundutas. Se iu interesiĝas pri lingvoj, kaj rakontas pri siaj problemoj kiel instruisto de fremda lingvo, tiam aŭskultu certan tempon – tio estas konvene, ĉar, unue, ĉar tio estas afabla, due, ĉar vi per tio iom lernas pri niaj celgrupoj. Ne donu la impreson ke vi vidas en la interesato nur iun objekton por misii.
- Allogas havi loterion, bonbonojn, glumarkojn aŭ simile ĉe sia stando.
- Oni elektu vestaĵon, depende de speco de foiro.
- Oni ne troigu pri E-aj simboloj (malrekomendatas verda stelo ie ajn).
- Se inter vizitantoj estas iu kveremulo/atakanto, oni ne eniru disputojn, kaj provu simple eviti la atakojn, lasi tiujn homojn opinii kion ili volas, kaj koncentriĝi ev. al aliaj vizitantoj.
- Pli gravas transdoni simpatian, kleran, fidindan bildon, ol multegajn informojn.
- Oni provu iom konversacii kun interesato, kaj tiel ekscii pri kio li ĉefe interesiĝas.

Afiŝoj

Unue pripensu:

- Ĉu vi volas informi pri Esperanto ĝenerale (bildo, "image") aŭ pri iu konkreta afero (kurso, renkontiĝo, aliĝeblo al asocio ktp)?
- Kion vi volas montri (ekz. internaciecon, interkompreniĝon, etoson)?
- Kien vi volas kaj povas meti la afiŝo(j)n?
- Celgrupojn: aĝe (lernejo, universitato), nivele (ĝenerala publiko, filtrita publiko)
- Kiom granda estas la buĝeto kaj kiom longe la afiŝo(j) pendu / restu aktuala(j)?
- Ne forgesu ke multe da teksto ne eblas enmeti.

Teknikaj/organizaj konsideroj:

- trovu taŭgan presejon
- informiĝu, kiujn programojn (ekz. PagerMaker, Corel, Photoshop) uzas la presejo
- konsideru limdatojn: kiam vi devas doni la dokumenton al presejo, kiom longe la presejo bezonas por presi ĝin: do se vi ekz. varbos por renkontiĝo, faru tempoplanon
- pli da koloroj signifas pli altajn kostojn
- ankaŭ la formato kaj la kvalito de la papero kundifinas la prezon´; ne forgesu ke eĉ plej zorgeme preparita materialo povas doni malbonan impreson se ĝi ne estas kvalite produktita
- se vi volas aŭ povas reuzi la afiŝon iam, eble ankaŭ en flugfolia formato aŭ simile, konsideru, ke tio povas tute alimaniere impresi (ol uzi ĝin tuj kaj kiel afiŝon)
- konsultu aliajn kunlaborantojn / fakulojn pri via afiŝo, ĉu ĝi plaĉas, ĉu ĝi atingas la atenditajn celojn / emocion / informigon
- informiĝu, kie vi rajtas afiŝi: afiŝo ĉe malpermesita aŭ nedezirata loko donas negativan impreson (ekz. ne metu afiŝon sur monumenton, privatan dommuron ktp.)
- planu ankaŭ post kurso, renkontiĝo ktp. formeti la koncernajn afiŝojn, aŭ elektu lokojn, kie vi ne mem devas forpreni la afiŝon, alie la vidanto kredos ke via organizo ne bone prizorgas siajn aferojn, postlasas rubaĵojn, kaj ne estas sufiĉe aktiva por formetado

Enhavaj demandoj:

- Zorgu ke fariĝas klare kio estas la ĉefa mesaĝo.
- Ne aldonu tro multe da teksto.
- Aranĝu tiel ke ne estu nur unu koloro, kaj vere tute ne devas aperi verda koloro. Informiĝu pri la efikoj de specifaj koloroj, ekz. *Nigro* estas malhela, sinistra, mistera, sed ankaŭ neŭtrala, dum *blanko* helas, afablas kaj estas malferma. *Bluo* ofte estas agrabla, neŭtraliga, esperiga. *Ruĝo* “krias”, do akiras atenton, sed precipe tro multo povas esti agresema. Ĉe *flavo* kaj *verdo* gravas la heleco: tro hele ili ĝenas, dum malhele ili povas

efiki trankvilige kaj plaĉe. Tamen, konsideru ankaŭ ke la efikoj de koloroj tre dependas de la ĉirkaŭo kaj temo, ankaŭ de kulturo.

- Estu originaleca, sed pensu ankaŭ pri eventuala “domstilo” de via asocio (ekz. vi ĉiam uzas similan kolorokoncepton, uzas certajn tiparojn ktp.). Ekzemple globo estas uzata ankaŭ de multaj aliaj asocioj. Ni havas la "esperanto-melonon" (du E-literoj ĉirkaŭ la globo), Pepon kaj aliajn TEJO/Esperanto-tipajn ikonojn. Verda stelo havas malavantaĝojn: diras nenion, steloj estas uzataj de multaj aliaj, kaj psikologie: pintaj aferoj estas malpli simpatiaj ol rondaj aferoj.
- Ne forgesu tiujn ĉi informojn (eble almenaŭ malgrande en angulo): kiu faris kaj respondecis la afiŝon, adreson; se temas pri renkontiĝo: dato, loko, kio ekzakte, eventuale speciala kontaktpersono, ceteraj kondiĉoj kiel kurskotizo.
- Povas utili por reuzado: lasu liberan spacon, kien vi poste povos presigi ekz. la datojn de nova kurso.

Aspektigado - Tipografio papere kaj rete

Tipoj

Tipo – origine peceto de metalo kun litero, kiu ebligis presadon (1450) kaj tiel malplimultekostigis kaj rapidigis produktadon de libroj.

- Iom poste estis eble ankaŭ produkti diversajn tiparojn.
- La unua lernolibro pri Esperanto por rusoj jam enhavis multaj diversajn liter-tipojn.

Okcident-eŭropaj literoj aperas en du specoj:

- Arial
- Serif (serifoj – aldonitaj, ĉefe horizontalaj, streketoj kiuj faciligas rekonon de literoj)

'Times' – tiparo de speco kun serifoj, farita en 1924 por la novaĵpapero "Times".
'Frakturo' – tiparo uzata por gutenburga biblio, kaj daŭre por titoloj en iuj gazetoj, sed malfacile legebla por nun-tempaj legantoj.

- Oni ne miksu multrajn tipojn en unu dokumento.
- Oni ne miksu serifajn kaj sen-serifajn tipojn.
- Por legindaj partoj de la teksto, oni elektu facile legeblajn tipojn.

Aliaj formatigoj

- Oni prefere NE ŝanĝu distancon inter literoj, ĉar ĝi estas plej bona tia kia ĝi estas difinita por ĉiu tiparo.
- Preferata liter-grandeco estas 10-12 pt.
- Tro grandajn literojn (ekz. en titolo) la okulo malpli facile kaptas. Tial eble sufiĉas grasigi titolojn, aŭ grandigi ilin al nur 14.
- Trapafo, distanco inter linioj, estu prefre 120% de liter-grandeco.
- Pli facilas legi malpli larĝan tekston, do ekz. havi du kolumnojn k.s. Nombro de vortoj en unu linio estu ne pli ol 13-18.
- Kiam linio estas tre mallonga kaj necesas streketa vortdivido ĉe fino de linio, ne estu pli ol 3 streketejo unu sub la alia.
- Oni povas fari tekston dekstro-randeca, maldekstro-randeca, centrigita (taŭga por anoncoj k.s, sed ne por longaj tekstoj) aŭ ambaŭ-randeca (preferata ĉe larĝaj kolumnoj, sed ne por malgrandaj, ne eblas en ĉiuj programoj, ĉe HTML k.s).
- Oni evitu komenci novan alineon fine de paĝo.
- Estu pli granda spaco inter du alienoj, ol inter linioj ene de unu alineo. Ĉe retpaĝoj taŭgas simple havi tutan malplenan linion inter alienoj.
- Ĉiukaze, tipografiaj normoj kaj kulturoj malsamas de lando al lando.

Emfazoj (substrekoj)

1. Ĉe skrib-maŝinoj eblis substreki vortojn por emfazi ilin.
2. Nuntempe en retpaĝoj oni prefere ne substreku por emfazi, ĉar la substreko plej ofte signifas alklakgeblon.
3. Alia maniero de ankoraŭ skribmaŝina tempo estas ’m e t i t a’, kun pligrandigita spaco inter literoj. Estis tre kutima en libroj.
4. Evitinda nuntempe, ĉar, kiel menciite, la distanco inter literoj estas ideale difinita por ĉiu paĝaro.
5. *Kursivaj* literoj aperis novtempe. Tre taŭgaj por emfazo ene de la teksto, vidigo de fremdaj vortoj k.s, sed en ekrano aspektas iom malbele kaj ne tiom facile legeblas, do evitinda ĉe retpaĝoj.
6. **Dikaj** literoj iĝis plej kutima emfazmaniero nun. Tamen, ĝi eble estas tro forta por enteksta emfazado, kaj oni ’rezervu’ ĝin por titoloj, aŭ emfazado kiam kursiva maniero ne taŭgas.
7. VERSALIOJ estas teksto-partoj per majusklaj literoj.
8. MAJUSKLETOJ estas tre utila por emfazi ion kio pli ofte aperas en la teksto (nomoj ekz).
9. Koloroj ofte uziĝas en retpaĝoj, por emfazi aŭ malsamigi partojn de la teksto.

Ĝeneralaj principoj:

- se longa parto de teksto estas emfazita, la emfazo perdas fortecon.
- oni ne uzu multajn specojn de emfazo ĉe sama teksto.

Formatoj

- ”pano-skribo” – ordinara/normala teksto, rekomendo por ne-retaj informiloj: serifa tiparo, ĉar ĝi estas plej facile legebla, almenaŭ ĉe presitaj materialoj
- titolo1 – (rekomendo) senserifa + pli granda (+2 pkt)
- titolo 2 – (rekomendo) **senserifa + grasa**

Informado pri Aranĝoj

Aranĝoj povas esti:

- Grandaj renkontiĝoj kiel IS, IJK ktp.
- Naci-skalaj Esperantokursoj / Esperantokursoj ligite al granda renkontiĝo (ekz. Internacia Lingvokurso)
- Landaj kaj lokaj renkontiĝoj

Vi mem decidu ĉu vere indas fari ĉiujn paŝojn - dependas de la grandeco de la renkontiĝo. Ankaŭ sciu, ke tia speco de informado estas frustriga laboro kaj 10% de reago de la gazetaro estas bona. :-) Vidu ankaŭ la paĝojn pri kontaktoj al ĵurnalistoj kaj gazetara komuniko.

Antaŭaranĝaj farendaĵoj

Por varbi ĉe ne-esperantistoj

- Preparu gazetaran komunikon (**ligo al teksto pri gazetara komuniko**) pri la aranĝo
  - Aldonu apartajn informojn pri la renkontiĝo
    - kiom da homoj
    - de kie ili venas
    - aĝgrupo
    - programo→ kiam estas la malferma tago por la ne-esperantista publiko
    - Eventuala esperantokurso antaŭ la renkontiĝo
  - Se vi havas **taŭgajn** fotojn de antaŭaj renkontiĝoj kaj pliaj informoj pri ili.
  - Kontaktadreso de
    - Certa persono de la organizantaro, kiu respondecas pri publikaj rilatoj
    - Aliĝadreso
    - Aldonaj aferoj, ekz. Internacia lingvokurso ktp.
- Kontaktu ĵurnalistojn pri la renkontiĝo (ĉefe de lokaj kaj regionaj gazetoj, se universitato / altlernejo en la urbo, ankaŭ al ili)
  - inter 1 kaj 6 monatoj (depende de la ĵurnalistaj labormetodoj kaj tipo de aranĝo) antaŭ la renkontiĝo: sendu / faksu gazetaran komunikon – ĝi ankaŭ sendeblas al grandaj gazetoj kaj se ili interesiĝas, tiam ili kontaktos nin ☺
  - unu semajnon post la dissendo de la informoj: telefonu kaj demandu, ĉu la ĵurnalistoj ricevis kaj ofertu respondojn por ev. demandoj
  - unu kaj duonan semajnon antaŭ la renkontiĝo: rememorigu pere de telefono aŭ dua gazetara komuniko kun pli detalaj informoj (kiom da homoj aliĝis, de kiuj landoj kaj detala programo) kaj invito viziti
- Kontaktu televidstaciojn kaj radiojn
- Uzu jam konatajn kontaktojn al ĵurnalistoj
- Inter 1 kaj 12 monatojn antaŭe: Informu la urbon (urba hejmpaĝo, biblioteko, lernejoj, universitatoj ktp.) kaj sendu afiŝojn kaj informojn
- Sufiĉe frue (inter 2 kaj 6 monatoj antaŭe) informu kaj klopodu inviti la urbestron

- unue skribu leteron kaj poste altelefonu (unu semajno poste) ŝlian oficejon

Por esperantistoj

- Disvastigu informojn en Esperantujo minimume kvar semajnojn antaŭ la fino de la unua pagkategorio
  - Rete tra dissendlistoj (**ligo al koncerna paĝo pri rete informi**)
  - Aperigu en kalendaroj (ekz. *Eventoj* kaj *TEJO-aktuale*)
  - Sendu aliĝilojn al LS kaj al la CO de UEA/TEJO
  - Faru budojn dum antaŭaj renkontiĝoj kaj estu preparita por kolekti antaŭpagojn

Dumaranĝaj farendaĵoj

- Havu respondeculon pri informado surloke. Ŝiaj/liaj taskoj estas:
  - Prizorgi la ĵurnalistojn
    - Gvidi ilin tra la renkontiĝo,
    - Respondi al demandoj.
  - Trovi taŭgajn esperantistojn.
  - Antaŭvidi tempon por interparolado kun ĵurnalistoj.
  - Eble prepari gazetaran kunvenon kun posta ebleco intervjui antaŭe selektitajn taŭgajn esperantistojn.
- Havu publikan vesperon tiom frue (eble dua aŭ tria vespero), ke ĵurnalista artikolo povas aperi dum la renkontiĝo.
- Eventuale dissendu gazetaran komunikon aŭ telefonu al regionaj kaj lokaj gazetoj post la unua tago de la renkontiĝo kun freŝaj informoj pri la renkontiĝo kaj invito al la publika tago. Estas pli avantaĝe telefoni, ĉar oni povas persone informi kaj respondi al demandoj kaj ankaŭ por certi, ke oni informis la koncernan ĵurnaliston.
- Kolektu aperitajn artikolojn pri la aranĝo.

Postaranĝaj farendaĵoj

- Sendu gazetaran komunikon en la lasta / antaŭlasta tago de la aranĝo kun rezultoj kaj se estas regula renkontiĝo, tiam menciu la sekvan.
- Disvastigu informojn pri esperanto kaj ontaj kursoj por lerni la lingvon (se estas iuj)
- Verku “centran artikolon” pri la renkontiĝo kaj disdonu ĝin al la partoprenantoj, por ke ili publikigu la artikolojn kun siaj nomoj en lokaj gazetoj en siaj urboj. Centra artikolo estas ŝablona raporto pri la renkontiĝo en la nacia lingvo.
- Konservu la adresojn de la ĵurnalistoj por ebla onta uzado.
- Kolektu aperintajn artikolojn pri la aranĝo.
- Danku al viaj kunlaborintoj.

Rilato al / kun ĵurnalistoj

Ĝenerala principo

- Konstanta daŭra kontakto – ankaŭ antaŭ renkontiĝo – havu reton da ĵurnalistoj kaj regule sendi mesaĝojn pri aranĝoj ktp. por ke ili sciu, ke ni ekzistas
- Ne forgesu, ke personaj kontaktoj (vide aŭ telefone) multe pli efikas ol (ret)poŝtaj.

Kiel prepariĝi

- Aspekto – dependas de la celgrupo kaj kian bildon ni mem volas prezenti
    - Junuloj: iomete pli leĝere / malformale
    - Maljunuloj: konsideru kravaton / ne tiom leĝera vestaĵojn, tamen ankaŭ eble leĝere
- Bone antaŭpreparigu al ĉioj eventualaj demandoj
    - Demandoj pri Esperanto rekte (Celo, Historio, Daŭre viva, Kulturo, lingvo mem, antaŭjuĝoj)
    - Demandoj pri la movado (Historio, ĉu vivanta, kulturo)
    - Demandoj pri persona spertoj kaj historio
    - Eventuale demandoj pri la renkontiĝo (kiam, kiom da homoj, de kie, kial ĝi okazos, programo)
    - Faru skizon de kiel vi volas ke la prezentado estu

Argumentado / Planado de la parolado

- Havu celon pri kio vi volas emfazi pri Esperanto
- Estu ĝentila kaj afabla
- Estu certa pri kio vi parolas kaj kian bildon pri Esperanto vi volas prezenti
- Ne tro insistu pri viaj punktoj
- Ne estu atakema
- Aŭskultu (kaj aŭdu) la ĵurnalistojn
- Estu pacienca eĉ kiam stultaj demandoj venos
- Ne ĉio, kion vi pensas memkomprenebla, estas memkomprenebla por eksteruloj
- Ne estu sekteca – ne tro emfazu la historion kaj esperantajn idolojn
- Ne uzu mitojn kaj malĝustajn faktojn / faktojn pri kiuj vi ne certas
- Se vi ne konsentas kun demando ĉiukaze respondu al la demando, ne evitu ĝin, ĉar ĝi povas reveni (pli akra)
- Se vi bezonas tempon respondante demandon, resumu la demandon en via respondo aŭ petu ripeton de la demando

Ne-mitaj faktoj de Esperanto

Faktoj:

- sendube kelk cent miloj da homoj aktive uzas la lingvon kaj pluraj milionoj lernis
- oni parolas Esperanton en ĉiuj kontinentoj kaj pli ol 120 landoj de la mondo
- eldoniĝas ĉ. 200-300 libroj jare pri aŭ en Esperanto, el kio ĉ. 60 estas beletraj (proksimume duono estas originale verkita, la resto estas tradukita al E-o)

Kampoj de aplikado:

- kulturo (libroj, gazetoj, muziko (Eurokka)) – kuniĝo de multaj kulturoj kaj kreiĝo de la propra(j)
- turismo (renkontiĝoj, vojaĝoj, Pasporta Servo, Monda Turismo)
- scienco (Akademio Internacia de Sciencoj, universitatoj en Budapeŝto, Poznan, …, DESKF)
- komerco kaj ekonomio (produktado de bonbonoj en Francio, E-vino, E-kakto)
- interreto (E-lingvaj programoj, apletoj, antaŭenigoj de diversaj teknikoj, paĝaroj pri urboj/regionoj/organizoj kun Esperanto kiel unu el elekteblaj lingvoj, vortaroj...)

Kresko-indikoj:

- muzik-bandoj kaj produktoj
  - en 70-aj jaroj ekzistis praktike neniu Esperanto-bando kiu eldonis proprajn kantojn; dum la lastaj 10 jaroj funkcias ekz. eldonejo Vinilkosmo specialiĝinta pri Esperanto-muzik-eldonaĵoj kaj en la reto troveblas paĝaroj de almenaŭ 20 divers-stilaj muzik-grupoj kies kantojn eblas elŝuti kaj dum E-renkontiĝoj okazas abundaj E- koncertoj kun diverslandaj reprezentantoj
- Esperanto-renkontiĝoj
  - Nombro de internaciaj renkontiĝoj en Germanio ekde 1970 kreskis de unu al kvin, dum nombro de partoprenantoj 14-obliĝis (de ĉ. 50 al ĉ. 700), kio signifas jaran kreskon de proksimume 10%
  - Dum la lastaj 10 jaroj aperis kaj tradiciiĝis Esperanto-renkontiĝoj (kongresoj, konferencoj, seminarioj, kunvenoj) –en Suda Ameriko, Afriko kaj Azio (landoj ĉ. Avganio, Hindio, Nepalo, Orienta Azio) kaj aperis deko da novaj naciaj junularaj organizoj
  - Junulara programo de UK-oj signife kreskis kaj tradiciiĝis dum la lastaj 8 jaroj
- konstante aperas ne-plenkreskaj Esperanto-parolantoj kaj la junulara agado plifortiĝas kaj internaciiĝas
- nombro de horoj jare dum kiuj averaĝa Esperantisto uzas Esperanton senteble kreskis dum la lastaj 20 jaroj

- la nombro de PS-gastigantoj duobliĝis dum la lastaj 20 jaroj
- la nombro de paĝoj kaj aktivaj uzantoj de Esperanto en la Interreto konstante kreskas, ĝia loko en listo de x plej uzataj lingvoj ne diversaj kampoj altiĝas, multnombriĝas programoj uzeblaj en Esperanto aŭ subtenantaj Esperanto-n

Demandoj de ĵurnalistoj kaj helpoj por respondi

Demandoj: Anna Skudlarska kaj Jevgenij Gaus
Respondo-provoj: Ziko M. Sikosek

1. Kio estas Esperanto?

Oni povas miri pri tiu demando, sed eble la ĵurnalisto vere ne scias tion, aŭ li volas simple aŭdi tion per la propraj, aŭtentikaj vortoj de esperantisto. Fakte, tio estas bona ŝanco por vi - oni donas al vi la eblecon mem influi la direkton de la intervjuo, per lerta respondo. Via respondu estu mallonga kaj baza: internacia lingvo, kiu evoluiĝis laŭ la projekto de sinjoro Zamenhof en Varsovio, aŭ simile. *(vidu dokumenton "Ne-mitaj faktoj pri Esperanto")*

2. De kie devenas la nomo Esperanto?

Kompreneble oni scivolemas la devenon de tiu stranga vorto. La titolo de la projekto de Zamenhof estis "Internacia lingvo", kaj li uzis la pseŭdonimon "Esperanto", ĉar li timis ke li povus ricevi problemojn - estis ja la cara Ruslando, kiu tre suspektis novajn aferojn. Sed li tre rapide malkaŝis la pseŭdonimon, kaj pere de "la lingvo de esperanto" kaj "esperanto-lingvo" ĝi fariĝis la nomo de la lingvo.

3. Kiam kaj kiel ĝi aperis?

Zamenhof estis judo el la getto, kaj spertis etnajn konfliktojn sur la stratoj de la multpopola Ruslando. En 1887 li eldonis broŝuron, en diversaj lingvoj, kun la bazaj reguloj kaj eta komenca vortaro.

4. Ĉu vi vere povas diri ĉion kion vi volas en Esperanto?

La esperantistoj komunikas per Esperanto pri tre malsamaj aferoj: ekzemple, la internaciaj Esperanto-asocioj kompreneble havas estrarajn kunsidojn ktp. en Esperanto. Oni verkas librojn en Esperanto, ekzistas radio-elsendoj. Kiam du diverslandaj parolantoj geedziĝas, ĝi fariĝas ofte eĉ familia lingvo.

5. Ĉu ekzistas iu kulturo en Esperanto?

Ne ofendiĝu pro tia demando, oni plej ofte ne volas "ataki", sed simple volas scii. Do, se la demando ankoraŭ ne respondiĝas per aliaj respondoj, menciu la iom specifan. nenacian kulturon de Esperanto. Al tio apartenas originale verkitaj libroj, la renkontiĝoj kun iliaj moroj (ekz. Internacia vespero), vortludoj, ŝercoj, dirmanieroj.

6. La angla jam estas internaciatutmonda lingvo - por kio oni devas lerni novan lingvon?

Kompreneble, estas bone ke oni lernas tiun gravan lingvon en lernejoj. Sed la esperantistoj aliflanke trovas same bone ke ili malkovras esperanton por si mem. Esperanto havas lingve

kelkajn avantaĝojn, ekzemple estas pli facile prononcebla, kaj Esperanto estas relative neŭtrala - ĉiu iam estis komencanto.

7. Kiom da homoj parolas Esperanton?

Oni ne scias ekzakte, ĉar ni ne povas detale superrigardi kiu lernas, kiu vere uzas ĝin, kiu membriĝas ie. Proksimume, 50.000 membras en asocioj aŭ havas aliajn konstantajn rilatojn al la lingva komunumo de Esperanto, do iras al renkontiĝoj, aĉetas librojn, korespondas...
La demando pri nombro estas tre tikla, kaj precipe malbonas se Esperanto-asocioj disvastigas malsamajn nombrojn. Kial la demando? Ĵurnalisto volas iom enketi pri la sukceso/allogeco de esperanto. Se vi diris ke "ĉiuj homoj lernu Esperanton" (kaj viu prefere ne diru tion), tiam la ĵurnalisto interesiĝas kiom multe via komunumo jam progresis sur tiu vojo.

8. Kie oni povas uzi la internacian lingvon?

Bone se vi povas mencii aplikojn, kiujn vi mem uzas, kaj pri kiuj vi povas rakonti iom konkrete. La demando estiĝas pro tio ke Esperanto ja ne estas lingvo de lando, al kiu oni vojaĝas.

9. Kiamaniere oni povas trovi aliajn geesperantistojn?

Simpla, "teknika" demando: reto, kontaktlistoj de Esperanto-asocioj, koresponda servo de UEA...

10. Ĉu vi estas sola en via urbo kiu parolas Esperanton?

Ofte oni estas la sola esperantisto en la propra urbo. Do, jen la ĵurnalisto demandas kun kiu vi parolas - tristas se oni solas kiel parolanto de lingvo. Vi sekve havas la okazon tuj poste informi pri la okazoj kiam vi jes parolas Esperanton.

11. Kial vi lernis ĝin?

Jen vi do devas individue respondi. Ŝajnas ĝenerale, ke inter la lingvemaj homoj multaj almenaŭ kiel junulo iam foje pripensas pri la eblecoj skribi la propran lingvon pli fonologie, aŭ eĉ inventi novan lingvon. Kiam oni do renkontas Esperanton, tiam oni havas la eblecon elprovi tion: ĉu lingvo kiel esperanto vere funkcias? Kaj kompreneble, en la Esperanto-komunumo oni trovas aliajn homojn, kiuj ankaŭ estas lingvemaj.

12. Kiam vi estas inter geesperantistoj, ĉu vi parolas nur en Esperanto?

La respondo povas trafi du malajn problemojn. Unuflanke, se vi neas ("ni ne ĉiam parolas Esperanton"), la ĵurnalisto povas kredi ke oni ne povas paroli esperante pri ĉio. Aliflanke, se vi jesas, la ĵurnalisto eble trovas tion fanatike kaj troisme.
Tial klarigu, kial oni kutime parolas Esperanton inter esperantistoj. Se vi iras al vespero de loka grupo, mi ja iras tion ĝuste por paroli en Esperanto. Aŭ, kiam oni estas en internacia renkontiĝo, estas ja malĝentile paroli kun samlandano en nacia lingvo, kaj la aliaj ne povas kunkonversacii. Sed kompreneble, kiam samnaciaj esperantistoj renkontas unu la alian, ili ne ĉiam parolas Esperanton. Ĝi ja estas fremda lingvo, kaj paroli en la gepatra lingvo ja ĉiam pli facilas, ĉu ne?

13. Ĉu vi ne pensas, ke Esperanto jam malvenkis?

Jen rezulto de ofta esperantista aserto, ke Esperanto havas certan celon kiel "la finan venkon". La ĵurnalisto kompreneble mem opinias, ke inter la celo "dua lingvo por ĉiuj" kaj la realeco estas granda diferenco. Se li kredas, ke la esperantistoj estas utopiistoj, li ja pravas. Kaj li provos "malkaŝi" tiun grandbuŝecon (li ja estas ĵurnalisto).
Do, la celo "dua lingvo por ĉiu" devigos nin ĉiam argumenti kaj aserti ke ni ne estas utopiistoj. Tian diskuton ni esperantistoj ne povas venki.
Pli bone vi povas respondi, ke kelkaj esperantistoj vere volas Esperanton fari "dua lingvo por ĉiu", sed ke tio ne validas por ĉiuj esperantistoj. La celo de multaj esperantistoj ja estas renkonti aliajn homojn, lerni pri aliaj landoj - kaj tiun celon oni ĉiam "atingas" kiam oni havas kontakton en tiu lingvo.

14. Ĉu vere Esperanto estas tro eŭropeca kaj pro tio por azianoj estas malfacile lerni ĝin?

Estas vero ke por azianoj estas malpli facile lerni Esperanton - multaj vortoj de Esperanto ja estas el eŭropaj lingvoj. Kial do azianoj tamen lernas ĝin? Ĉar ĝi kompare al aliaj eŭropaj lingvoj ja havas la samajn lingvajn avantaĝojn, kiujn Esperanto havas ankaŭ por eŭropaj esperantistoj, ke ekzemple ne ekzistas malsamaj gramatikaj seksoj/genroj. Krome, iuj strukturaj trajtoj de Esperanto (alglutineblo ekz) pli similas al aziaj ol eŭropaj lingvoj.

15. Kiom facila estas Esperanto por lerni? Ĉu ĝi vere estas pli facila ol ĉiuj aliaj lingvoj? Kial?

Jen tre komprenebla demando - ni esperantistoj ja daŭre mencias la "facilecon de Esperanto". Vi povas respondi kiel vi lernis Esperanton, kaj kiom longe vi bezonis. Diru ke la lern-rapideco de dependas de faktoroj, ekz. ĉu lernanto estas tre talenta. Mi ekzemple foje renkontas homojn kiuj estas komencantoj kaj parolas en komprenebla maniero, sed malrapide kaj kun fuŝetoj - sed mi tiam tre surpriziĝas kiam mi aŭdas ke la koncerna komencanto vere eklernis nur antaŭ tri aŭ kvar monatoj.

Malfacilas diri ion ĝeneralan ("ĉiu povas lerni Esperanton en x horoj"). Provu eviti tion.

Gravas ke povas mencii kelkajn tre facile kompreneblajn ekzemplojn, kial esperanto pli facilas ol aliaj lingvoj. Ne diru ekz. "la elparolo estas fonologia" - nur fakuloj komprenus tion. Diru ekzemple: kiam oni lernas la anglan, kaj oni renkontas novan vorton, tiam oni eĉ ne scias kiel prononci ĝin bone. Ekzemple, la anglaj vortoj put kaj cut estas skribitaj tre simile, sed en la unua oni prononcas tiun u kiel u, en la dua kiel a. Alie, en Esperanto oni ĉiam vidas per la skribo kiel oni prononcas vorton. Unufoje lernu la esperantan alfabeton - kaj vi ne plu havas "ortografiajn problemojn".

16. Ĉu tre simpla strukturo de la lingvo ne igas la lingvon primitiva?

Jen fakte la granda danĝero, kiam ni diras ekzemple ke la Esperanto-gramatiko havas nur "16 regulojn". Fakte, tiu propaganda mito venas ankoraŭ de Zamenhof mem. Sed "gramatiko" estas nur priskribo de lingvo, kaj oni povas priskribi lingvon tre malsame. Kaj kompreneble la "16 reguloj" ne sufiĉas por scipovi esperanton.

Esperanto havas la eblecojn kiel aliaj lingvoj, ekzemple oni povas kaj en la germana kaj en Esperanto vidi kiu vorto estas en la objekta rolo en frazo. Sed en la germana oni devas lerni multajn gramatikajn formojn, dum en Esperanto oni devas lerni nur unu gramatikan formon.

17. De kie estas prenitaj la vortoj? Ĉu ekzistas iuj vortaroj en Esperanto?

Esperanto estas, kompare kun aliaj malgrandaj lingvoj (se necese: menciu la bretonan, galegan), tre bone ekipita per lerniloj, vortaroj ktp. Ekzistas nacilingvaj vortaroj, do ekz. Esperanto-franca, franca-Esperanto, sed ankaŭ unulingvaj, kie post la vortoj aperas klarigoj resp. difinoj en Esperanto mem.

La plej multaj vortoj estas el latinidaj lingvoj, kiel la itala aŭ franca. Tiuj vortoj ofte estas rekoneblaj en multaj vortoj, kiel ... (Prenu vortojn, kiujn viaj samnacianoj povas kompreni. Atentu ke vi ne elektas "negativajn vortojn", kiel "mizero", "pestilenco". Atentu ĉi-kaze, ke vi ne mencias grekdevenan vorton kiel ekzemplon de romanida vorto, ekz. "katastrofo".)

Kelkaj estas el la ĝermanaj kaj slavaj vortoj, por eviti sam-aspektajn vortojn kun simila signifo.

18. Ĉu ekzistas denaskaj esperantistoj?

La demando pri infanoj kiuj parolas Esperanton povas rilati al la scivolemo, "kiom normala" estas Esperanto. Do jes, ekzistas tiaj infanoj, kiuj krom nacia lingvo lernas ankaŭ Esperanton. La Esperanto-gepatroj estas kutime homoj kiuj zorgas pri bona ĝenerala kaj lingva edukiĝo, ekzemple faras lingvajn ludojn, laŭtlegas, disponigas legolibrojn, tial tiuj infanoj ĝenerale havas almenaŭ bonan bazon por bone lerni la gepatran nacian lingvon kaj ankaŭ Esperanton. Sed ne ĉiu infano de esperantistoj lernas Esperanton, tio tre dependas de la emo de la gepatroj kaj de la kreskiĝanta infano.

19. Ĉu Esperanto estas sola artefarita lingvo? Kion vi povas diri pri aliaj artefaritaj lingvoj? Kiujn avantaĝojn havas Esperanto rilate aliajn artefaritajn lingvojn?

Foje fakte ĵurnalistoj aŭdis pri aliaj projektoj, precipe Volapük. Eble ili legis en leksikono pri ĝi. Ne polemiku pri tiuj aliaj projektoj, ĉar tio sonas arogante kaj estas ridinde - se Esperanto ne "venkis", kial esperantisto rajtas ridi pri aliaj tiaj lingvoj?

Se Esperanto estas la plej multe uzata planlingvo, tio havas du kialojn:

a. Zamenhof multe laboris por Esperanto kaj povis trovi simpation por ĝi. Li kreis la lingvon tradukante popularajn verkojn (la bilblion, Shakespeare), do ekde la komenco igis ĝin viva, taŭga por ĉitaga uzo.
b. Kelkaj aŭtoroj volis krei lingvon tre regulitan kaj skematikan. Tia estas malfacile lernebla kaj uzebla. Aliaj aŭtoroj ĉefe imitis la jam ekzistantajn lingvon, ĉefe la romanidajn. Esperanto estas lerta kompromiso inter ambaŭ direktoj, aŭ, per la vortoj de Umberto Eco: "Esperanto estas bone farita lingvo."

20. Ĉu eblas en Esperanto esprimi emociojn kaj sentojn? Ĉu eblas diri la frazon "mi amas vin" en Esperanto?

Do, la ĵurnalisto elprovas la taŭgecon de Esperanto, kaj ankaŭ elprovas ĉu la Esperanto-reprezentanto vere scipovas ĝin. Jen eta dilemo: se vi tradukas la frazon kaj diras ĝin tre malrapide kaj bone kompreneble, tiam la leganto/aŭskultanto povas eble jam iomete kompreni, bone. Sed aliflanke oni povus kredi ke oni povas paroli Esperanton nur pene kaj malrapide. Alia poluso de la dilemo: se vi rapide parolas, tiam oni pensas: ho, mi nenion komprenis, ŝajne Esperanto ne estas tiom facila. Solvo: diru la frazon unue en normala rapideco, poste ripeti ĝin tre klare kaj malrapide.

21. Ĉu en Esperanto ekzistas dialektoj?

Oni povas iomete aŭdi, de kie venas alilanda esperantisto. Sed oni povas tamen bone kompreni unu la alian. Kompreneble, ekz. junuloj parolas iom alie ol maljunuloj, kiel en ĉiuj lingvoj. Diferencetoj kiuj aperas en parolo de diversaj grupoj de esperantistoj ne pligrandiĝas kun tempo, eĉ male.

22. Ĉu Esperanto estas vivanta lingvo? Ĉu la lingvo evoluas?

Jes, kiam homoj uzas lingvon, tiam ĝi iomete ŝanĝiĝas. Do, kiam aperas novaj aferoj, ekzemple novaj inventaĵoj, tiam oni bezonas novan vorton. Oni aŭ enkondukas novan vorton aŭ kunmetas novan vorton el jam ekzistantaj. Ekzistas Akademio de Esperanto kaj ankaŭ la norma vortaro PIV, tial la lingvouzo tamen restas unueca.

23. Ĉu en iuj landoj Esperanto estas subtenanta de registaroj?

Foje ĵurnalisto eble demandas kiel la registaroj opinias pri Esperanto, aŭ ĉu Esperanto-asocioj havas rilatojn al registaro. La fono de la demando eble estas enketi pri la reputacio de esperantistoj ĉe ŝtataj organoj, aŭ ekscii ĉu la esperantistoj estas kontraŭŝtataj kveremuloj.

La respondo kompreneble dependu de la situacio en via lando. Se paroli pri Germanio, la federacia ministerio pri junularo subtenas la agadon de Germana Esperanto-Junularo, do ekz. mone subtenas la Internacian Semajnon. (Jen okazo mencii tiun renkontiĝon.) La mesaĝo estu: ni estas serioza asocio kiu pozitive laboras kun junularo, faras ion bonan por junularo, kaj la ŝtato rekonas tion.

24. Ĉu vi povas mencii kelkajn famulojn, kiuj parolis(-as) Esperanton?

Fakte, mi ankoraŭ neniam aŭdis tiun demandon, sed ĝi povas esti ke iu demandos tion. Atentu, ke vi mencias personojn bone konatajn en via lando (lokajn famulojn), kaj personojn kiuj ne estas pridisputataj. Ekzemple, mi ne mencius la diktatoron Tito, kiu dum iu restado en malliberejo lernis kelkajn vortojn.

25. Se la lingvo vere estas bona kaj pli facila ol ĉiuj aliaj, kial do ĝis nun ĝi ne iĝis oficiala?

Respondo al tia demando kompreneble dependas de tio kion vi opinias mem pri Esperanto. Se vi vere volas ke ĉiuj homoj lernu Esperanton, tiam vi havos problemon: danĝera estas la tento malbeni la tutan eksteran mondon kaj nomi la normalajn homojn stultaj aŭ fiaj - per tio vi ja ofendas la ĵurnaliston kaj ties legantojn/aŭskultantojn. Pli milde estas, se vi atentigas ke povas ja esti ke io bona kaj taŭga ne tuj estas akceptata kiel tia.

Se vi pensas pri pragmatike kaj modere pri Esperanto kaj la mondo, eblas diri, ke vi eltrovis ke Esperanto estas io bona por vi mem kaj aliaj homoj, sed ke aliaj homoj ja havas eble aliajn interesiĝojn aŭ bezonojn. Kaj oni ja trovas iun agadon aŭ hobion bona, tio ja ne signifas nepre ke oni mem faras tion. Tamen, simple "gustumi" Esperanton, ĉar ĝi ja estas interesa afero, tion la esperantistoj povas certe senprobleme rekomendi al ĉiuj homoj kiuj interesiĝas pri lingvoj aŭ aliaj landoj.